

d-ro Zlatko Hinšt (HR):

OPINIO PRI LA TERMINOJ „TRAFLUO“; „DEBITO“ KAJ „SPEZO“

Reagoj al terminoj diskutintaj en Konstru-Forumo n-roj 9 (januaro), 10 (marto) kaj 11 (junio) sub punkto 15 iniciitaj de Fabien van Mook – aperigintaj en retejo de TAKE

Estas bone fari trarigardon de koncernaj terminoj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, Represo de la tria eldono kun suplemento, 1987, SAT, Paris.

La verbo „flui“ estas klarigata kiel (paĝoj – de 295 plue ĝis aliaj detaloj 298):

1. (por likvaĵoj – ekzemple akvo) – Moviĝi seninterrompe malsupren laŭ deklivo
2. (por fluidaĵoj – ekzemple aero) – Moviĝi seninterrompe k facile de unu loko al alia
3. (por diversaj aferoj – ekzemple, mono, belarta esprimado ktp) - Amase seninterrompe direktiĝi al ien

Sekvas unu klarigo pri adverbo „flue“: Facile k glate trapasi de unu momento al alia.

Tri klarigoj rilatas al adjektivoj kiel estas kazoj

1. (por konvenaj signifoj – ekzemple, karakterizo de akvo) - Kure fluanta akvo
2. (por konvenaj signifoj – ekzemple, fluanta stilo, fluante paroli-Esperanton, anglan ktp)
3. Likva (kiel arkaisma esprimo) oni anstataŭigas per „flua“

Substantivo „fluo“ havas tri signifojn en diversaj kuntekstoj

1. (por konvenaj signifoj – ekzemple, kurba kaj neregula fluo de rivero, naĝi kontraŭ la fluo) - Movo de tio, kio fluas
2. (por konvenaj signifoj – ekzemple, fluo da homoj, fluo de la turistoj, diversaj fluoj da opinioj, inkluzive doktrinojn) - Io, kio amase k saminterrompe samdirektiĝas
3. Kurento estas en iuj kazoj anstataŭigebla per „fluo“

Uzado de prefikso tra- faras verbon traflui – en signifo de traflui io akceptebla en diversaj kuntekstoj - (ekzemple, rivero trafluas kanjonon, ebanajon ktp, amo trafluas la animon/koron)

Estas ebla ankaŭ uzado de adjektivo „traflua“ (ekzemple, traflua kapacito).

Koncerne diskuto ni povas proponi apliko de termino „trafluo“ (angle flow), aŭ se oni temas pri mezurado de difinitaj unuoj termino „trafluokvanto“. Kolego Rémy Bouchet (en Ko-Fo 10) proponas „elfluokvanto“ kiel unu parte akcepteblan solvon. Entute akcepteblan solvon proponis kolego Jan Werner – trafluokvanto. Kolegoj Đorđe Obradović kaj Bronislav Ĉupin (Ko-Fo 11) estas ankaŭ bone pripensis pri tiu afero.

En PIV por estas klarigoj por verbo „elflui“:

1. Flui el io (sango el korpo)
2. Eliĝi el io (konkludoj el faktoj, elfluo de profito el koncerna fonto, mal/bonaj vortoj el homo ktp)

Por substantivo „elfluo“ estas klarigoj:

1. Tio, kio elfluas (akvo - el rivero, fontano),
2. Ĉio, kio, normale aŭ ne, elfluas el la korpo (elfluo el korpo).

Por la substantivo „elfluokvanto“ estas klarigo: La kvanto da akvo, kiu povas trapasi tra la efluilo dum difinita tempo.

Por la verbo „enflui“ klarigo estas: Enflui en ion (riveroj kaj aliaj akvoj enfluas en maro ktp). Por la substantivo „enfluo“: Movo de tio, kio enfluas (loko aŭ parto de io kie io enfluas al io).

Rimarko (ZH): „Elfluokvanto“ povas ekzisti en la kazo de aliaj likvaĵoj (oleo, alkoholo ktp) kaj fluidaĵoj (aero). Grava parto de difino estas „difinita tempo“ (ebleco de esprimado de mezurita kvanto po unuo de tempo) kiel argumento al „elfluokvanto“. Sed koncerna termino ŝajnas ke „elfluo“ devenas el unu direkto (ekzemple, el tubo al spaco por kolekti ion). Pro tio termino „trafluokvanto“ estas pli bona, ĉar estas konvena por esprimi movigojn en iuj direktoj (el, en, tra), inkluzive fluidaĵojn. Precipe tio estas grave kiam rekte oni mencias fizikaj mezurunuoj (kombinoj de mezuroj de pezo kaj longeco kun tempunuoj). Ekzemple, en Ko-Fo 9 kolego Fabien van Mook menciis kg/s kaj m³/s. Li tiam uzas terminon „debito“-n. Tiel li akcentis masan debiton, volumenan, energian, debiton de humidaĵo (akvo), ventolan, varm-debiton, radian kaj luman debiton. Ĉi-tiu termino estas neniel por rekomendi en tekniko.

Nome, en PIV termino „debito“ kiel substantivo estas klarigita en signifo(j): Facila podetala aŭ pogranda vendado de varo; serĉateco de varo: (sekvas ekzemplo – *tiu komercaĵo havas grandan debiton* – t.e. certa varo multe en kvanto, inkluzive prezon, favore vendadas en merkato – lasta klarigo de ZH). Post estas klarigo por verbo „debiti“: Detale disvendadi, kaj finfine de substantivo „debitejo“: Butiko de podetala vendado (paĝo 168).

Estas evidente ke nunaj signifoj ligita kun negocado – komerco enhavas tro da detaloj, eĉ parto de unuopaj difinoj ekskludas aliaj iliaj partoj. Plej bone tion pruvas „podetala aŭ pogranda vendado“ en determinado de substantivo, kiu poste fariĝas nur „podetala vendado“, konfirmigita per adverbo kun verbo „detale disvendadi“. Sekvontaj detaloj kiuj ĝenas en apliko, precipe faka, estas parenceco kun termino „debitoro“ (ŝuldanto). Vorto „debitoro“ konsistas el radiko *debit-* kaj sufikso *or* (por profesiaj kaj aliaj karakterizoj). Sed estas interese ke PIV kaj ĝenerale Esperanto ne uzas originala vorto „debito“ en signifo de „ŝuldo“, eĉ similan terminon „debeto“-n. Pro tio estas eblaj eraroj kaj intermiksado de terminoj.

Plua nekonvena cirkonstanco, kiun, bedaŭrinde, kolego Mook ne rimarkis, estas homonimeco de vorto „débit“ en franca lingvo. Interalie, krom komercaj ja aliaj aferoj, „debito“ estas en vortaroj reprezentata kiel mezurado po tempunuo. Pro tio estas eble ke kolego Bouchet trovis en menciita esperanta-franca vortaro „Grand dictionnaire“ de Gaston Waringhien (vidu Ko-Fo 10) ke esperanta „elfluokvanto“ estas franclingva „débit“. Laŭ lia opinio estas eble eviti francismom de menciita „elfluokvanto“ per „enfluokvanto“. Laŭ mia opinio evitado de francdevena termino „débit“ estas tre dezirebla kaj bezonata ne per ŝanĝo de sufikso „el“ kun „en“, kiel faris kolego Bouchet, eĉ rekte de termino „debito“ kiun deziras enkonduki kolego Mook, pro ĝia homonimeco.

Ankaŭ estas grave akcenti ke Mook menciis (en Ko-Fo 9) germana termino „(Mengen)strom“ kaj itala „portata“ ne estas la plej konvenaj terminoj. Germanlingve „der Strom“ estas elektro/-a energio, sed estas eble pli sukcese uzi terminon „die Strömung“. Pli bonaj ankaŭ estas terminoj „der Lauf“ aŭ „der Verlauf“ kaj „der Gang aŭ Vergang“ kiuj estas pli proksimaj laŭ esperanta *fluo*. Angla „flow rate“, neniel nur „rate“ (*flow* Mook signis per parentezo, kio estas neakceptebla) estas relative bona termino kiu indikas al mezurado po tempunuo. Itala „portata“ estas plursignifa homonimo, verŝajne ekzistas pli konvena termino, precipe faka.

Estas interese rimarki ke en vortaroj de esperanta - kroata kaj serba lingvoj kaj vs (en eksa Jugoslavio ono ofte uzis komuna nomo „serb(o)kroata“ aŭ kroat(o)serba“ estas distingo de menciitaj germanaj vortoj tielmainere (simalaj vortoj estas en unuopaj slavajn lingvojn): Reĉnik srpskohrvatsko-esperantski Serbkroata – Esperanta vortaro de Antonije Sekelj, Beograd, Grafos, 1967.

struja – elektro, kurento; fluo (vodena) struja-nje/ti – flu-o/i, moviĝ-o/i, cirkulad-o/i
tok – fluo; irado, marŝado, sinskvado, evoluo utroŝak – elspezo (novac) konsumo

Reĉnik Esperantsko-srpskohrvatski Esperanta-serbokroata vortaro de Stevan Živanović kaj Marinko Gjivoje, IKS - Internacia kultura servo, Zagreb, Edistudio, Pisa, 1979.

flui – teĉi; flue – teĉno; fluo – tok, struja, fluaĵo – tekuĉina

ranjo Gruić – Josip Pleadin – Aleksandar Kocian – Antun Šimunić: Vortaro Esperanto – Kroatserba Kroatserba – Esperanto”, la 9-a eldono de ES “Liberiga Stelo” Osijek – “Koko” Đurđevac, 1989.

kosti – koŝtati (cijena) elspezo – izdatak spezo – proĉa, promet, troŝkovi prihod –
enspezo troŝak – elspezo, kosto troŝan – eluzita, kaduka troŝiti (novac) – elspezi hranu
(konsumi) rabiti (eluzi) tok - fluo utržak - enspezo

En la rusa lingvo „fluo“ estas „teĉenie“, „hod“. Kroate kaj serbe verbo „flui“ estas „teĉi“ kaj substantivo „hod“ estas „kretanje“ (movigo, ir(ad)o). En kroata kaj serba lingvoj ekzistas „hod vlakova“ (movigo de trajnoj). „Prihod“ estas „enspezo“ kaj „rashod“ estas „elspezo“. Sed „hod“ ne respondas al signifo „spezo“ en Esperanto por neutrala punkto. Verbo „rashodovati“ signifas „dekalkuli“ (el inventaro, maŝino ktp). En slovena lingvo ekzistas „prihod in odhod vlakov“ (alveturo kaj forveturo de trajnoj).

Terminoj „elektro-a“ (energio) kaj kurento estas unuavice teknikaj terminoj laŭ origino, aplikeblaj en ekonomio se estas bezontaj elementoj de specoj de kostoj, produktado, vendado, aĉetado ktp (objektoj). Kiam oni mendas materialoj por produktado elektra energio estas unu speco de postulita varo aŭ servo. Akcentante, eluzado de kapacitoj kiel teknikoj kaj teknologioj oni povas uzi terminon „traflua kapacito“, ne ekskluzive terminojn „enflua“ kaj „elflua kapacito“ aŭ aliaj terminoj. Distingoj laŭ eblaj terminoj „traflukvanta“, „el-“, kaj „en-“, estas ke lastaj reprezentas kapacito(j) laŭ grado (procento) aŭ alia mezuro (fizika) de kapacito aspekte de utiligado (uzado).

Termino „fluo“ estas aplikebla en ekonomio, tekniko kaj ĝenerale en scienco kaj verkado, inkluzive gazetajn tekstojn. Ekzemple, en matematiko oni povas paroli pri infinteza kalkulo kiel „senrompita fluo de infitezimaj grandoj kiel estas integraloj (ankoraŭ oni ligas vektorojn por la nocio „flukso“), en fiziko (elektrotekniko) „magneta fluo“, en kemio „fluo de kemiaj procesoj“, en biologio „fluo de evoluo“ (ĝenerale de tuto de vivantaj kaj eksvivantaj organismoj, inkluzive de unuopaj vivestaĵoj), en financoj „monfluo“ – ne nur kiel iu ajn sumo da mono, eĉ esprimi ĉi-termine oficialajn dokumentoj en unuopaj landoj, entreprenoj, bankoj kaj institucioj. En sociologio ekzistas specifaj fluoj en evoluo de socio (ankoraŭ oni povas paroli pri fluoj de evoluo de evoluo de tekniko kaj teknologio, organizaj aferoj kaj teorioj), kaj ankaŭ por psikologiaj fenomenoj. Medicino havas siaj fluo en evoluo de malsanoj kaj sanigo de malsanuloj. Ankaŭ „flui“ estas komune uzebla – en kutimaj kuntekstoj (laŭlitere fluas riveroj, sed en vasta senco fluas tempo), povas sekvi apliko kiel: fluas kurento, fluas mono, inkluzive finfine „historia fluo“ kaj „vivfluo“.

Estas vere bona konkludo de s-ro Wermer ke „flukvanto“, antaŭe „traflukvanto“ kontentigas koncernajn postulojn kaj gajnas ĉi-tiu nomindiko.. Sekvas provoizoran konkludon (kiu oni ŝajnas) ke nek spezo nek debito „vekis bonvolon akcepti iun el ili por la tehnik apliko“. Kiel estas stato kun termino „spezo“ en PIV kaj ĝiaj nuancoj (parencaj vortoj)?

Sur la paĝo 1020 estas difino: Operacio, per kiu monsumoj estas transigataj de unu kaso al alia, de unu konto al alia. Post substantivo, sekvas verbo „spezi“ kiel: Transigi sumon de unu konto al alia ktp.

Unuopaj ekzemploj montras ke „spezo“ estas ĝenerala termino por iuj monoperacio, en neutrala pozicio aspekte de eniro kaj eliro de monrimedoj, respektive pli precize ampleksas ambaŭ kazojn. „Elspezo“ estas rezulto de elpagado (por kostoj). „Enspezo“ estas ricevado de monrimedoj flanke se alia (jura) persono, te. rezulto de enpagado. Tia estas ĝisnuna situacio por koncernaj terminoj. Sed estas evidente ke radiko spez- (devenas el itala vorto „spesa“ signifanta „kosto“ en itala lingvo) entute ne respondas al veraj kaj logikaj rilatoj inter vortoj. Komprenble, ne estas korekte preni vorton el unu signifo por kontraŭa signifo farante ĝin per sufikso kiu ne povas el bazo ŝanĝi signifon de radiko. Vere „elspezo“ kaj „enspezo“ gramatike analizante ne distingus tiel kiel aspektas en nuna uzado de koncernaj terminoj. Enspezo estas ankaŭ en sia esenco kaj laŭ logika senco – unu aspekto de elspezo, sed por alia flanko (persono), siaspeca „enkosto“. En kroata (kaj en serba) lingvoj ekzistas termino „trošak“ (kosto), kaj per sufikso „u“ (en) ĝi fariĝas „utrošak“ (enkosto). Mia intenco ne estas en ĉiuj kazoj transpreni logikon de kroata lingvo en esperanto, sed ekzemplo estas instruema kaj indikema. El konto de ŝuldanto oni povas elspezi monon por pagi al liverantoj de materialoj kiuj koncernan monon ricevas dankante de enspezado de ŝuldanta mono. Estas evidente en preciza lingva kaj faka analizo ke mankas korektaj fakterminoj en Esperanto. Koncernaj terminoj estas gravaj ne nur en ekonomi(k)o, eĉ kiel aldonaj teknikaj analizoj.

Pro tio estas bona konkludo je unu flanko por „traflukvanto“ de J. Werner kiel „mia opinio“ en Ko-Fo 11, sed aliflanke pro kio estas plua konkludo „se mi estus elektanta inter debito kaj spezo, mi preferus *spezon*, kiu pli bone harmonias kun la aktuala semantiko de la radiko *spez*“. Estas vere demando por argumentite respondi.

Sed ekzistas aliaj aliroj kaj aplikoj de terminoj – ekzemple „elspezo“. En ĉi-tiu kazo ne kiel monrimedoj, eĉ „pen-elspezoj“ kaŭzitaĵ per homa laboro kaj siaspeca „elspezoj de korpo“ pro kiuj homa organismo konsumas energion kaj kalorion, inkluzive fizikan kaj mensan forton. Tia ebleco ne ekzistas en latinidaj lingvoj, sed en slavaj jes (kroata estas bona ekzemplo en vorto „enspezo“ kiu povus esti alia flanko de „elspezoj“). Titolo de prelego dum prova bosnia-hercegovina San-Marineca Universitata Studadsesio (SUS) en Banja Luka de mag. Alicja Lewanderska-Quednau,

profesorino de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino tio plej bone indikas kun supozebla influo semantiko de (spirito) pola lingvo:

„Teknikoj kaj metodoj de mensa laboro kaj ergonomiaj mezuroj de fizikaj kaj psikaj pen-elspezoj“ (vidu Programon de menciita SUS en retejo www.ais-sanmarino.org). Mi ne preferas „elspezoj“-n kiel termino „pen-elspezoj“. Elspezo estas ekonomia, pli precize financa termino, precipe se ni sekvas konsekvente laŭliteran sencon el itala lingvo (radiko „spesa“). Se ekzistas „pen-elspezo“ kiu termino signifanta eluzado de muskuloj, nervoj, fizikaj kaj mensaj fortoj de homo dum laboro, estas kompreneble supozi eblecon pri termino „pen-enspezoj“. Sekvante en nuna signifo „enspezo“-n kiel financa termino estas logike supozi ke „pen-enspezoj“ estus – konsumado kiel enigado en homa korpo nutraĵoj, trinkaĵoj, eĉ stimulativaj rimedoj kiel aldonoj, por ebligi normalan homan laboron.

En vortaroj, interalie en PIV kun klarigoj, oni troviĝas vortoj kiel estas: „eluzita“ por objektoj (maŝinoj, ekipaĵoj, meblaro, domo ktp). Verboj estas „eluzi“ (Difekti per longa uzado, PIV) kaj „foruzi“ (Tute konsumi per uzado, PIV), en refleksiva formo „eluziĝi“ (Fariĝi eluzita, PIV,) kaj „foruziĝi“. Por homoj estas destinita vorto „kaduka“ (pro maljuneco – „kaduka homo“). Kiel substantivoj oni uzas vortojn „eluziteco“ (kaŭzita de longa uzado aŭ de malbona kvalito, kaj de ambaŭ kaŭzoj) kaj „kadukeco“ (kaŭzita de aĝo). Ekzemple, fontoj povas esti „elĉerpitaj“. Kiel substantivo oni uzas vorton „elĉerpigo“.

Menciita kroata vorto substantivo „trošak“ (singularo) – „troškovi“ (pluralo) signifas „kosto- (j)“. Kiel verbo „troŝiti“ (troŝ + iti por infinitivo) signifas kaj estas tradukebla en Esperanto kiel „konsumi“ (nutraĵo). Kiel verbo „istroŝiti“ („iz“ kiu estas E-prepozicio „el“ fariĝas „is“ + troŝiti) signifas samtempe „eluzi“ kaj „fouzi“ (maŝinon kiu poste estas preta por amortizi) kaj plu en financa senco „elspezi“ (monon) en produktado, difinita objekto ktp. Verbo „utroŝiti“ („u“ – E-prepozicio „en“ + troŝiti) pli bone estas konvena por traduki en Esperanto kiel „enspezi“. Bedaŭrinde, en la nuna stato de E-signifoj „utroŝiti“ restas kiel „elspezi“, sed ne en sufiĉe preciza signifo. Unue tio estas materialo elspezita (en financa senco kiel mono – speco de kostoj) kaj due uzita kiel materio (en „fizika“ senco) en produktado, konstruado ktp. Samaj signifoj estas ankaŭ en serba/montenegra kaj bosnia lingvo). Kroatlingve „utroŝeni materijal“ (aŭ „potroŝeni materijal“ kiel sinomino) havas du signifojn, t.e. fariĝas homonimo. Sama kazo estas kun sintagmo „utroŝena“ (potroŝena) sredstva“ kiu unuflanke estas monrimedoj elspezitaj en io kaj aliflanke materialoj en fizikaj unuoj (metroj, kilogramoj ktp) uzita en produktado, konstruado ktp. Ankaŭ estas pli bone esperantlingve uzi, se oni farus necesajn modifojn en Esperanto, „enspezitaj rimedoj“ ol „elspezita rimedoj“ por kostoj kaj „konsumitaj rimedoj“ por konsumado de materialoj.